Esperanto-Francilio

# Invito al la Ĝeneralaj Asembleoj
# la 23an de marto 2025

Kara membro,

Mi invitas vin al la oficialaj Ĝeneralaj Asembleoj (ĜAj) por la jaro 2025 de la francilia federacio de esperanto, dimanĉon la 23an de marto.

Unue okazos Eksterordinara Ĝenerala Asembleo (EĜA), de la 10a ĝis la 10a kaj duono. La celo de la EĜA estas decidi ĉu modifi la statutojn de la asocio. Poste okazos Ordinara Ĝenerala Asembleo (OĜA) kiel ĉiujare, de la 10a kaj duono ĝis la 12a.

La ĜAj okazos en nia sidejo, 4bis rue de la Cerisaie, Parizo.

Vi povos partopreni ankaŭ rete per la jena ligilo :

https://us06web.zoom.us/j/81596620899?pwd=iZT6nkac30Z7MoXx8VOHrYMz6L0L8P.1 ID de réunion: 815 9662 0899 Code secret: 163903

Antaŭ la ĜAj okazos baloto. Por la EĜA, la baloto decidos ĉu modifi la statutojn de la asocio por malaltigi la minimuman nombron de komitatanoj. Por la OĜA, la baloto decidos ĉu validigi la agadraporton kaj la financan raporton de la pasinta jaro, kaj elektos novan komitaton. La 2 raportoj kaj la sinprezentoj de la kandidatoj legeblos en nia retejo al https://esperanto.paris/membro-kunvenoj La baloto okazos rete. Vi ricevos specifan mesaĝon de ***balotilo.org*** kun ligilo por voĉdoni. La reta baloto finiĝos la 22an de marto je 00:00. Tial vi devas voĉdoni plej malfrue la 21an de marto vespere.

La tagordo de la EĜA estas la jena:

- publikigo de la rezultoj de la voĉdonado pri la ŝanĝo de statuto

La tagordo de la OĜA estas la jena:

- publikigo de la rezultoj de la voĉdonado: (mal)konsento pri la 2 raportoj, elekto de nova komitato
- trarigardo de 2024, agadplano por 2025, peto de ideoj kaj helpo

Mi esperas vian partoprenon en niaj ĝeneralaj asembleoj kaj ĝojas tiam saluti vin.

Post la ĜAj, nia asocio donos aperitivon.

Poste ni kune tagmanĝos, bonvolu alporti manĝaĵojn kaj trinkaĵojn por dividi.

Post la tagmanĝo, ni proponas al vi viziti la portempan ekspozicion "Empreinte carbone, l'expo !" en la Muzeo pri Artoj kaj Metioj. La ekspozicio temas pri la historio de la karbona spuro, kiel ĝi naskiĝas, kiel ni konsumas karbonon kaj fine kiujn solvojn ni povas uzi por redukti tiun spuron cele al la atingo de "karbona neŭtreco" en 2050.

Ni proponas al vi iri piede de la Ĉerizejo ĝis la muzeo, trapasante la Placon de Vogezoj kaj laŭirante la stratojn de Turenne, de Bretagne kaj Réaumur. Tiu promeno daŭros ĉirkaŭ 40 minutojn. Se vi preferas iri metroe, vi povos vojaĝi per la linio 5 ĝis Respubliko kaj poste per la linio 11. Espereble ni atingos la muzeon sufiĉe frue por profiti la senkrompagan ĉiĉeronitan viziton kiu komenciĝos je la 3a kaj duono posttagmeze kaj daŭros 45 minutojn.

Adreso: Musée des Arts et Métiers, 60 rue Réaumur, metroo Arts-et-Métiers. La prezo estas 12€,la bileto permesas ankaŭ viziti la tutan muzeon ĝis la 6a posttagmeze. En la retejo https://www.arts-et-metiers.net/musee/tarifs vi povas ekscii ĉu vi ĝuos rabaton kaj antaŭe aĉeti vian bileton.

-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

Chère ou cher membre,

Je vous invite aux Assemblées Générales (AG) pour 2025 de la fédération Espéranto Paris Ile-de-France, le dimanche 23 mars de 10h à 12h.

D'abord se tiendra une Assemblée Générale Extraordinaire (AGE), de 10h à 10h30. Le but de l'AGE est de décider ou non une modification des statuts de notre association. Ensuite se tiendra, comme chaque année, une Assemblée Générale Ordinaire (AGO), de 10h30 à 12h.

Les deux AG se tiendront à notre siège, 4bis rue de la Cerisaie, Paris.

Vous pouvez aussi participer en ligne par le lien :

https://us06web.zoom.us/j/81596620899?pwd=iZT6nkac30Z7MoXx8VOHrYMz6L0L8P.1 ID de réunion: 815 9662 0899 Code secret: 163903

Avant l'AG aura lieu un vote. Pour l'AGE, le vote décidera de modifier ou non les statuts pour diminuer le nombre minimum de membres du conseil d'administration. Pour l'AGO, le vote décidera de valider ou non le rapport d'activité et le rapport financier, et élira un nouveau conseil d'administration. Les deux rapports et la présentation des candidats seront disponibles dans notre site à https://esperanto.paris/membro-kunvenoj Vous voterez en ligne. Vous recevrez un message spécifique venant de ***balotilo.org*** avec un lien pour voter. Le vote en ligne s'achèvera le 22 mars à 0 heure, donc vous devez voter au plus tard le 21 mars au soir.

L'ordre du jour de l'AGE est le suivant :

- publication du résultat du vote : modification ou non des statuts

L'ordre du jour de l'AG est le suivant :

- publication du résultat du vote : validation ou non des 2 rapports, élection d'un nouveau conseil
- bilan de 2024, plan d'action pour 2025, collecte d'idées et d'aide

J'espère que vous participerez à nos AG et je me réjouis de vous saluer à cette occasion.

Après les AG, notre association offrira l'apéritif.

Ensuite nous déjeunerons ensemble, apportez de la nourriture et des boissons à partager.

Après le déjeuner, nous vous proposons de visiter l'exposition temporaire « Empreinte carbone, l'expo ! » au Musée des Arts et Métiers. L'exposition présente l'histoire de l'empreinte carbone, comment elle se crée, comment nous consommons du carbone et enfin comment trouver des solutions pour réduire notre empreinte carbone, dans l'objectif de la neutralité carbone en 2050.

Nous vous proposons d'aller à pied du siège au musée, en traversant la place des Vosges et en suivant les rues de Turenne, de Bretagne et Réaumur. Cette promenade durera environ 40 minutes. Si vous préférez y aller en métro, vous pourrez prendre la ligne 5 jusqu'à République puis la ligne 11. Espérons que nous atteindrons le musée à temps pour profiter de la visite guidée sans supplément qui démarrera à 15h30 et durera 45 minutes.

Adresse : Musée des Arts et Métiers, 60 rue Réaumur, métro Arts-et-Métiers. Le prix est 12€, le ticket permet de visiter tout le musée jusqu'à 18h. Dans le site https://www.arts-et-metiers.net/musee/tarifs vous pouvez voir si vous avez droit à un prix réduit et acheter à l'avance votre ticket.

Sincere via, sincèrement vôtre,

Aleks Kadar, prezidanto, président